Ni Ĉiuj

Duonjara Revuo de Meksika Esperanto Federacio

Numero 1/2010

LA INSTRUADO DE ESPERANTO: INDA SPERTO PERSONE, PROFESIE KAJ MOVADE

La instruado kondukas al saĝeco
León-Portilla en Esperanto
Esperanto: Lengua y Cultura en la UABC

ANTAŬPAROLO

Ĉiuj homoj havas sian propran opinion rilate al kiu(j) estas la plej grava(j) ago(j) en Esperantujo por sukcesigi la daŭran vivon kaj konstantan kreskon de la Internacia Lingvo Esperanto. Kelkaj opinias ke per taŭga amasinformado uloj enkapigu avantaĵojn iĝi esperantisto kaj, konsekvence, tion ili faros. Aliaj pensas ke la plej efika metodo teni vivantan movadon estas forte labori por inkludigi la lingvon en internaciaj kaj gravaj instancoj kiel ekz. UNESKO, UN, Eŭropa Unio, ktp., kaj tiel doni pli da graveco, ekster Esperantujo, al nia lingvo. Aliaj asertas ke la instruado estas la plej ĉefa bazo por enkonduki la homojn al la movado, por akompani ilin transiri la vojon kaj poste lasi ilin en "tuta verda stato", tiel ke poste ili sekvu iel kontribuante en la movado.

Laŭ mia ankoraŭ malvasta sperto en la movado, ni devas koncentriĝi en ĉiuj menciitaj punktoj: informado, kunlaboro kun gravaj instancoj kaj instruado, sed tre gravas ke oni ne tro klinu la pesilon al iu punkto kaj lasu en forgeso la aliajn. Kompreneble oni sola ne povas fari ĉion samtempe kaj pro tio ni devas unuigi fortojn, kapablecojn, lertecojn por atingi niajn celojn.

En la nuna numero de "NI ĈIUJ", ni trakos la trian punkton, tiel en *"**LA INSTRUADO DE ESPERANTO: INDA SPERTO PERSONE, PROFESIE KAJ MOVADE**",* la verkistoj donos al la legantoj informojn pri siaj spertoj instruante la lingvon, tiel ke eble vi povus lerni de ili, rememori viajn propajn travivaĵojn aŭ, ni

esperas, helpi vin fari la decidon ekinstrui Esperanton memorante ke oni ne devas scii ĉion por fari la unuan paŝon.

Kiel kutime vi povos koni iom pli pri la historio de Esperanto en Meksiko pere de leginda artikolo de *Schmitter*: “León-Portilla en Esperanto”, ni decidis publiki ĝin kaj en Esperanto kaj en la hispana kun la celo informi pri tiu grava temo ne nur al la esperantistaro sed ankaŭ al la ekstera publiko.

Fine vi havos novaĵojn pri lastaj kaj gravaj esperantaj aktivecoj en la lando kiel la baldaŭa instruado de Esperanto en la Universidad Autónoma de Baja California (UABC) aŭ la propono farita al internaciaj konsilianoj de la Monda Socia Forumo: uzi Eon kiel ilia laborlingvo. Legu ankaŭ la alvokon de franca samideano *Bergeot*, kiu invitas nin partopreni en speciala maniero la festivalon “*Change d'air”.*

Kiel ĉiam mi profitas la okazon dankegi al niaj novaj kaj daŭraj kunlaborantoj pro kundividi kun ni iliajn verkojn, fotojn, bildojn, opiniojn, ktp, kelkajn el ili vi konos per la karikaturportretoj faritaj de José Cruz Pacheco kiu, krom la krovilo, speciale desegnis ilin por “NI ĈIUJ”

Nun “NI ĈIUJ” estas tute via, ĝuu ĝin kaj mi petas al vi sendi viajn komentojn kaj proponojn pri tiu ĉi kaj antaŭaj numeroj al nicxiuj@esperanto-mexico.org Kunlaboru kun NI ĈIUJ!

Mallely Martínez Mateos

Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

ENHAVO

ANTAŬPAROLO 2

LA INSTRUADO DE ESPERANTO: INDA SPERTO PERSONE, PROFESIE KAJ MOVADE 5

La instruado kondukas al saĝeco – Daniel Moreno Martínez 5

Mia unua sperto instruante Esperanton – Morayma Martínez Mateos 7

Lerni Esperanton estas amuza, neniam enua – Ulises Franco Pérez 9

POR LA HISTORIO DE ESPERANTO EN MEKSIKO 12

León-Portilla en Esperanto, esperanta versio – Juan Jacobo Schmitter Soto 12

León-Portilla en Esperanto, hispana versio – Juan Jacobo Schmitter Soto 15

KUNVOKO AL ĜENERALA ASEMBLEO DE MEF, 2010 18

CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL DE LA FME, 2010 19

LASTAJ RIMARKINDAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO 20

PRI EKSTERLANDA AGADO 22

Salutu miajn vilaĝanojn – Pascal Bergeot 22

LA INSTRUADO DE ESPERANTO: INDA SPERTO PERSONE, PROFESIE KAJ MOVADE

LA INSTRUADO KONDUKAS AL SAĜECO

Daniel Moreno Martínez

"Interesa estas la vojo, kiun oni prenas por lerni esperanton; sed pli interesa, laŭ mi, estas la vojo, kiun oni prenas por instrui ĝin."

Kiam mi komencis lerni esperanton mi tute ne imagis ke iam mi instruus ĝin. La lernado de esperanto ja estis tre interesa kaj afabla dank' al tio ke oni rapide kapablas interkomuniki kun samideanoj de la tuta mondo. Certe ĉar estas manko de oficialaj, profesiaj lernejoj de esperanto, la lernantoj mem devas zorgi pri sia lernado kaj tiamaniere ĉiu lernanto povus iĝi instruisto.

Sed kiam oni prenas la taskon instrui al aliaj, la afero iĝas pli interesa. De komence la instruanto rimarkas kiom granda kaj vasta estas la lingvo ĉar per la scivolemo kaj spertoj de la lernantoj stariĝas novaj demandoj kaj kuriozaĵoj de la lingvo, kiujn la instruanto ne rimarkis kiam li estis lernanto.

Por mi la sperto komenci instrui estis ja grandvalora kaj iamaniere nervoziga ĉar tiam mi nur havis konon pri la lingvo kaj havis malgrandan sperton babilante kun aliaj

samideanoj sed mi nenion sciis pri instruado. Estis amiko, Luis Córdova, kiu puŝis min instrui la lingvon.

Mi konis lin dank' al universitata gazeto, per kiu mi eksciis pri esperanta kurso en Jura Fakultato. Malgraŭ tio ke tiam mi havis relative bonan scion pri la lingvo kaj gramatiko, mi decidis partopreni la kurson ĉar ne estis multaj opcioj por babili persone en Meksikurbo, kaj estis tre bona ŝanco profiti kaj paroli rekte kun alia samideano sen uzo de komputilo aŭ aliaj teĥnikaĵoj.

Post ne multe da tempo li konsilis min komenci instrui esperanton al novaj lernantoj, kaj afable oferis sian helpon rilate al administraj aferoj pri la kurso, ĉar li mem estas instruisto en la Jura Fakultato kaj havas rilaton kun gravaj personoj. Tiam mi estis surprizita kaj tuj pensis pri la grava respondeco gvidi tian grupon, ĉar, kiel mi esprimis antaŭe, mi havis nek grandan sperton babilante nek sperton pri instruado.

Finfine kaj feliĉe mi akceptis kaj en 2007 mi komencis instrui la lingvon internacian en la Jura Fakultato de UNAM (Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko). Krom tio ke estas granda honoro instrui en tiu grava fakultato de la nacia universitato, estis grandega plezuro por mi instrui esperanton kaj rapide mi tre ŝatis tiun taskon, kiun mi diligente kaj ĝojplene faris.

Unu el la plej rimarkindaj aferoj, kiun mi malkovris estas ke ĉiam partoprenas homoj, kiuj havas tre diversajn interesojn kaj ŝatokupojn. Inter la partoprenantoj, ĉiam estis kaj junaj kaj maljunaj homoj kun tre malsamaj fakoj, ĉu sciencaj, ĉu artaj, ĉu homaj, ĉu politikaj, ktp., ktp. Sendepende pri la fako mi povas diri ke konstante kurson post kurso partoprenas inteligentaj homoj, kiuj deziras plivastigi

Centra biblioteko de la UNAM, foto prenita de http://bc.unam.mx/

siajn kulturajn konojn kaj spertojn. Kutime estas homoj, kiuj ne konas limon kaj ĉiam pretas lerni ion pli pri diversaj aferoj. Ĉu idealemaj, ĉu naivaj, sed ĉiam interesaj kaj afablaj.

Dank' al tio ke mi dum la kursoj estas en kontakto kun tiaj interesaj homoj, mi mem havas la senton kaj deziron pliprofundigi miajn konojn ne nur pri esperanto sed pri la tuto, kion mi pritraktas kun miaj lernantoj. Tiu afero estas la plej interesa, laŭ mi, ĉar ne estas unu-direkta instruado en kiu nur mi instruas al la lernantoj, sed temas pri divers-direkta instruado en kiu kaj mi kaj la lernantoj instruas kaj lernas per la propraj spertoj ĉiu-klase ion novan; ĉu pri esperanto, ĉu pri la plej diversaj temoj. Sed interese estas ke kiam ni lasas la klasĉambron, ni estas iom pli saĝaj ol kiam ni eniris ĝin.

Gelernantoj de Daniel Moreno je la fino de kurso en UNAM

MIA UNUA SPERTO INSTRUANTE ESPERANTON

Morayma Martínez Mateos

Antaŭ 4 jaroj, pli malpli, mi eklernis esperanton. Tiam mi ne sciis kiom da bonaj aferoj donus al mi lerni la preskaŭ "nekonatan lingvon".

La Eo-instrua aventuro komencis antaŭ kelkaj monatoj, kiam mia fratino kaj mi decidis instrui per ĉeestanta kurso en la vilaĝo kie ni

loĝas. Estis du grupoj: de infanoj kaj plenkreskulinoj. Laŭ nia kunakordo, mi instruus la infanojn kaj mia fratino la aliajn, sed semajno post la komenco de la kursoj, ŝi faris vojaĝon kaj mi devis resti kun ambaŭ grupoj.

Je la komenco por mi estis defio ĉar mi neniam instruis esperanton persone, nur per la reto kaj apogata de jam farita retkurso. Mi tiom timis! Estus mia unua fojo kiel esperanta instruisto kaj de du tute malsamaj grupoj!

Mi komencis kun ne tro da memfido sed iom post iom, dum la tempo pasis, mi perdis la timon, preparis la klasojn kaj plu lernis pri ĝeneralaj kaj gramatikaj temoj por bone instrui ilin, foj-foje mi nervozis sed ĉiam mi provis entuziasme lernigi la gelernantojn.

Morayma Martínez instruante Esperanton

Post kelkaj semajnoj, mia fratino revenis kaj finfine ni interŝanĝis la grupojn, ĉar mi malkovris ke mi sentis min pli komforta kun la aĝulinoj ol kun la geetuloj. Tiel dum la resto de la kursoj, ŝi instruis al infanoj kaj mi al plenkreskulinoj.

En mia ĉefa grupo estis ses lernantinoj: kvar jam havas familian vivon, du el ili ankaŭ laboras eksterdome. La aliaj du ankoraŭ studas en gimnazio. Malgraŭ la malsamaj aĝoj kaj interesoj, la etoso dum la klasoj estis vere agrabla, amuza kaj ni multe lernis. Bona sperto estas ke kiam iu ne faris la taskon, tiu devis kunporti dolĉaĵojn aŭ ion por manĝi dum la klaso.

La lernantinoj kiuj “tre bone lernis Eon”

La kurso finis la lastan semajnon de majo. Mi sincere diras ke estis bonega sperto kaj indas

ripeti ĝin. Mi ja konfirmis ke esti instruisto ne nur temas pri stari kaj paroli antaŭ personoj; estas interŝanĝo de konoj kaj sciigo de multaj aliaj aferoj: kion oni instruas kaj lernas, akiri memfidon, lerni esti tolerema, respekti la aliajn, labori teame, fari kunakordojn... Kiel instruisto oni respondecas pri la instruado kaj la maniero fari ĝin, sed sen la lernantoj, la instruisto ne povas fini tiun proceson. Kiel en ĉiuj komunikaj rilatoj, unu sen la alia ne povas ekzisti. Ni ĉiuj estas malsamaj tamen tiu diferenco iĝis bela esperantlernadteamo... je la fino ni sekvis la saman vojon kaj atingis la saman celon.

Mia fina konkludo estas ke en ĉiu momento de la vivo, de ĉio kaj de ĉiuj, oni lernas ion. La plej grava afero estas neniam timi fari erarojn, ĉar per ili oni pli bone kaj pli rapide lernas... Do mi esperas baldaŭ havi denove la eblon kundividi miajn konojn pri Esperanto kun aliaj.

LERNI ESPERANTON ESTAS AMUZA, NENIAM ENUA

Ulises Franco Pérez

Decembre 2009 dum kutima sabata renkontiĝo de nia klubo en Gvadalaharo (*Guadalajara*), parolante pri la celoj kaj planoj de nia aktivulado, ni alvenis al sama temo: aranĝi kurson de Esperanto.

Ni decidis doni la unuan kurson de la internacia lingvo ĉar kelkaj amikoj kaj konatoj niaj tre interesiĝis pri Esperanto kaj volis lerni ĝin, krome, nia celo estis / as divastigi Esperanton en nia urbo kaj esperantigi tapatiojn[1] ĉar eĉ se Gvadalaharo estas tre granda urbo, la dua plej granda kaj grava en

[1] En Meksiko oni nomas hispane “Tapatio” al uloj el Gvadalaharo.

Meksiko kun pli ol 4 milionoj da enloĝantoj kune kun ĝia metropola zono, malfacilas trovi homojn kiuj almenaŭ sciu kio Esperanto estas, do pli malfacile trovi esperanto-parolantojn.

Komence ni opiniis ke la projekto iĝos granda laboro ĉar ni ne spertis pri instruado de la lingvo, sed post diskutado inter la organizantoj, Sara González, Edgar López, Katharine Brownshire kaj mi, konkludis ke ni ekinstruu per facilaj kaj amuzaj iloj, do ni elektis agrabligi la lernadatmosferon ne uzante tre seriozajn kaj formalajn instrumetodojn, tial la kurso estu plenamikema, t.e., simpla, amuza renkontiĝo inter geamikoj.

Gvidantoj kaj gelernantoj de Guadalajara dum renkontiĝo ludas kaj lernas

Je la eko ni ofertis al niaj gelernantoj etan vortaron kaj donacis lernolibron. Sed por ebligi la amuziĝon en la lernado ni dezajnis ludojn esperante, kiel ekzemple: memorludon pri bestoj kaj alian pri korelativoj, pendumit-ludon pri diversaj temoj, ludkartojn kaj, nian plej ŝatatan, esperantan loterion pri legomoj (kies venkanto gajnas meksikan peson de ĉiuj aliaj ludantoj).

Esperanta kuko por festi!

Tiel ni sekvis la planadon laŭ la ritmo de la gelernantoj, la postuloj de la klasoj kaj la novaj ideoj de la gvidantoj. Kelkfoje ni legis ĉapitrojn de “Gerda malaperis”. Alian fojon ni donis al ili diversajn ekzercojn aŭ spektis etajn filmojn; ni multe amuziĝis kaj samtempe tio tre utilis al la novaj gelernantoj. Ankaŭ, post la lecionoj ni kutime manĝis ion kune kaj, certe, ni neniam forgesis festi la naskiĝtagon de niaj anoj.

Ni devas konfesi ke la plej malfacilaj temoj por la komencantoj estis la akuzativo kaj la finaĵoj -ig- -iĝ- sed ni, kaj ili ankaŭ, konsciis ke nur per la praktiko oni sukcesos bone kompreni kaj uzi tiajn kaj aliajn gramatikaĵojn.

Nun estas pli malpli naŭ konstantaj junaj partoprenantoj en nia klubo, foje venas pliaj kaj per nia konstanta agado ni esperas ke la grupo kreskadu. Ĝis nun la renkontiĝoj okazas ĉiun semajnfinon, ĉi majo ni alvenis al la 38ª kaj certe ni sekvos!

Klubanoj el Guadalajara ĝuante kaj lernante Esperanton

Niaj geamikoj tuj ŝatis la internacian lingvon kaj ni estas tre feliĉaj pro tio. Ni ankaŭ multe lernis kune kun ili, fakte danke al ili ni plu studis la gramatikon kaj plibonigis nian paroladon.

Post tiu ĉi sperto, mi rekomendas al samideanoj, kiuj instruas aŭ instruos nian verdan lingvon uzi amuzan kurson kiu enhavu filmetojn, kantojn, bildojn, rakontojn, anekdotojn, humuraĵojn, ktp. Nia moto estas: lerni Esperanton devu esti amuza, neniam enua!

POR LA HISTORIO DE ESPERANTO EN MEKSIKO

LEÓN-PORTILLA EN ESPERANTO

Dro. Miguel León-Portilla

Juan Jacobo Schmitter Soto

La prelego pri naŭatla kulturo eble okazis en *Palacio de Minería*, koloniepoka konstruaĵo en la centro de Urbo Meksiko, aŭ en simila ejo, verŝajne ĉirkaŭ la centjariĝo de Esperanto en 1987. Timidaj sed decidemaj, Enrique kaj mi atendis la finon kaj proksimiĝis al la preleginto, d-ro Miguel León-Portilla.

Mi ĵus ekkonis kamaradon *Enrique Lemus Rodríguez*, kiu estis serĉanta min, korpremita ĉar la tiame fantoma Meksika Esperanto-Federacio (MEF) havis nenian planon por festi la okazon. Enrique kaj mi havis plurajn ideojn, inter ili repreni la tradukadon de la libro *Visión de los Vencidos* en esperanton.

La afablega d-ro León-Portilla diris al ni, ke li tre ĝojas vidante finfine la realiĝon de tio, kion li de multaj eldonoj menciadis en la antaŭparolo al *Visión de los*

Vencidos, tio estas: ke la Esperanta versio jam ekzistis kiel unu inter multaj tradukaĵoj de lia plej konata libro. Mi ne scias kiu promesis al li tiun tradukon, en praa epoko, neniam plenuminte la promeson.

Enrique kaj mi certigis al li, ke la origina promeso estis farita kiam ni estis ankoraŭ infanoj; tamen, kiel junuloj ni entuziasme pretis plenumi la projekton de aliaj iniciatitan. Ni komencis per kelkaj el la *iknokŭikatl* aŭ "tristaj kantoj", naŭatlaj poemoj pri la konkero de Meksiko; ĉi tiuj aperis poe ĉ. 1992 en bulteno de la tiama Meksika Asocio Por Internacia Lingvo, precipe laŭ tradukoj de Enrique.

Poste, ni klopodis kunlabori kun Jorge Luis Gutiérrez. Miamemore, ni tri neniam iris preter la temo de la titolo, kiu ja estis defío: en hispana lingvo kaj ĉi-kuntekste, *visión* signifas "opinio, vidpunkto, sperto". Ĉi-kaze la vidpunkto de la aztekoj, venkitoj de la hispano Hernán Cortés. La vorto povas signifi ankaŭ "bildo, imagaĵo". Tamen, la tradukoj rekte en esperanto, kiel "vidpunkto de l' venkitoj", tute perdis la patoson de la originalo. Ni ne sukcesis atingi konkludon pri la plej eleganta kaj ĝusta maniero repreni la titolon.

Ni ja multe parolis, kvankam iom abstrakte, pri la bezono de neologismoj, ekzemple por traduki *chalchihuites*. Ni ja povintus utiligi *jadon* aŭ *jadeiton*, tamen tiu kaj aliaj naŭatlismoj estis gravaj en la originalo; do, ni decidis riĉigi la Esperantan vortaron per *ĉalĉiŭitoj* k.s.

Ni ne tute konsentis pri la maniero imiti la ripeteman, insisteman lingvaĵon de la deksesjarcentaj malnovhispanaj kaj naŭatlaj tekstoj arigitaj de León-Portilla. Esperanto havas malmultajn sinonimojn, eble pro ĝia klarigema, precizema celo, tiel ke diri la samon per tri malsimilaj manieroj, reakirante la arkaismecan guston de la verko, ne ĉiam estis facile.

Enrique, Jorge Luis kaj mi povintus daŭre kafejumi dum jardekoj. Tamen, Leonora Torres, tiama prezidentino de MEF, sukcesis revivigi la forvaporiĝintan asocion organizante en Urbo Meksiko la Tutamerikan Kongreson de Esperanto en

2001. Do, en la jaro 2000 ŝi firme invitis nin kompletigi la eternan tradukadon, por prezenti la libron dum la kunveno.

Mi provis akceli la laboron kun Enrique kaj Jorge Luis, sed la streĉeco venkis super mi, tiel ke fine mi tradukis la libron preskaŭ sola. Miaj kolegoj reviziis la rezulton, tamen iom supraĵe, tiel ke ne malmultaj eraroj enrampiĝis, pro rapidemo kaj nesperto. Estis ja Jorge Luis kiu zorgis pri la eldonado de la libro, ankaŭ sub horloĝa premo.

M. León-Portilla kaj J. Schmitter prezentante "Tra l' okuloj de l' venkitoj" dum la 5ª TAKE en Meksiko

Malgraŭ ĉio, la libro publikiĝis ĝustatempe, kaj d-ro Miguel honoris nin per sia partopreno en ties prezento dum tiu tutamerika kongreso. Mi trovis lin tre ĉarma, liaj okuloj sparkis kiam li parolis, kaj li aŭskultis simpatie kaj atenteme kiam mi tradukis liajn vortojn por la esperantista publiko (ĉu eble 500 homoj? Kvindeko da landoj?).

Mi povas imagi hodiaŭ la modestan eldonaĵon de MEF de *Tra l'okuloj de l' venkitoj* (fine mi trovis tion akceptebla solvo por la titola dilemo) en elstara loko sur la breto de León-Portilla, apud la versioj hungara, rusa, ĉina, araba, naŭatla…



hispana versio



angla versio



franca versio

germana versio

kataluna versio

pola versio

LEÓN-PORTILLA EN ESPERANTO

Dro. Miguel León-Portilla

Juan Jacobo Schmitter Soto



La conferencia sobre cultura náhuatl debe haber tenido lugar en el Palacio de Minería o un sitio similar, allá por el año del centenario de la Lengua Internacional (1987). Tímidos pero decididos, Enrique y yo esperamos el final y nos acercamos al ponente, el Dr. Miguel León-Portilla.

Yo apenas acababa de conocer al camarada Enrique Lemus Rodríguez. Fue él quien me buscó, angustiado porque la, en ese entonces fantasmal, Federación Mexicana de Esperanto (MEF) no pensaba hacer nada para conmemorar los 100 años de la publicación del primer libro en el idioma. Enrique y yo teníamos varias ideas, entre ellas retomar la traducción de *Visión de los Vencidos* al esperanto.

El afabilísimo Doctor León-Portilla nos dijo que le alegraba mucho ver que por fin se convertía en realidad lo que él mencionaba desde hacía numerosas ediciones en el prólogo de *Visión de los Vencidos*, a saber: que la versión en esperanto era una de las muchas traducciones de su libro más conocido. No sé quién le había prometido tal traducción en una época inmemorial, sin cumplir el ofrecimiento.

Enrique y yo le aseguramos que cuando se hizo originalmente tal promesa éramos unos niños, pero ya como jóvenes nos comprometimos a cumplir esa iniciativa ajena. Iniciamos con algunos de los *icnocuícatl* o “cantos tristes”, poemas nahuas sobre la conquista de México; éstos aparecieron hacia 1992 en un boletín de la extinta Asociación Mexicana Pro-Lengua Internacional, sobre todo en traducciones de Enrique.

Más tarde, tratamos de coordinarnos con Jorge Luis Gutiérrez. Recuerdo que no pasamos de discutir el tema del título, todo un desafío: “Visión”, en español y en este contexto, lleva el sentido de “opinión o experiencia”. en este caso de los derrotados por Hernán Cortés, más que de “imagen o representación”, pero la traducción directa en esperanto perdía el *pathos* del original en español. No alcanzamos un acuerdo sobre la manera más elegante y exacta de retomar el título.

Sí platicamos mucho, aunque un tanto en abstracto, sobre la necesidad de neologismos, por ejemplo para traducir “chalchihuites”. Podríamos haber aprovechado *jado* (= “jade”) o *jadeito* (=”jadeíta”), pero ése y otros mil nahuatlismos eran importantes, de modo que enriquecimos el vocabulario del esperanto con palabras tales como *ĉalĉiŭitoj*.

Algo en lo que tampoco alcanzamos consenso fue en la manera de imitar el lenguaje insistente, repetitivo, lleno de paráfrasis, de los textos originales en español del siglo XVI y en náhuatl recopilados por León-Portilla. Hay pocos sinónimos en esperanto, dada la vocación clara y precisa del idioma, de modo que decir lo mismo de tres maneras distintas y rescatando el sabor arcáico no fue siempre sencillo.

Enrique, Jorge Luis y yo hubiéramos seguido disfrutando cafés durante décadas, de no ser porque Leonora Torres, a la sazón en la presidencia, logró sacar a MEF de su fantasmagórico marasmo mediante la organización en la Ciudad de México de un Congreso Panamericano de Esperanto, en 2001. Entonces, en el año 2000 nos conminó a terminar la eterna traducción, para presentar el libro durante el evento.

Intenté retomar las cosas con Enrique y Jorge Luis, pero me ganó la angustia, y finalmente concluí la traducción yo solo. Mis colegas hicieron al final alguna revisión, pero francamente somera, de modo que se colaron no pocos errores de prisa y de inexperiencia. Eso sí, fue Jorge Luis quien se encargó de la edición del libro, contra reloj.

Con todo, la publicación salió a tiempo, y don Miguel nos hizo el enorme honor de participar en la presentación del libro durante aquel congreso panamericano. Me pareció encantador. Le chispeaban los ojos al hablar, y escuchaba con simpatía y atención mientras yo hacía la traducción simultánea para el público esperantista (¿tal vez unas 500 personas? ¿una cincuentena de países?).

Imagino que hoy la modesta edición por la propia MEF de *Tra l'okuloj de l' venkitoj* (literalmente, "a través de los ojos de los vencidos": tal fue mi chapucera solución al dilema del título) debe estar en lugar prominente en el librero de León-Portilla, junto a las versiones húngara, rusa, china, árabe, náhuatl…

versión en español



versión en polaco

versión en catalán

versión en alemán



versión en francés



versión en inglés

KUNVOKO AL ĜENERALA ASEMBLEO DE MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO, 2010

MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO invitas ĉiujn siajn anojn al asembleo, kiu okazos la 4an de septembro 2010 je la 10a horo, en ĝia oficiala sidejo kiu troviĝas en Av. 523 # 187, 1a. Sección de San Juan de Aragón, del. Gustavo A. Madero. Distrito Federal. CP. 07969. La asembleo okazos laŭ la prezentata:

Tagordo:

1.- Malfermo kaj listo de anoj ĉeestantaj kaj aprobo de la tagordo.
2.- Estrara jara raporto.
4.- Ĝeneralaj aferoj:
a).- Laborplano.
b).- Esploro pri la sidejo de la venonta nacia kongreso.
c).- Informo pri la trasdono de MEF-anaĵoj de la eksestraro al la nunaj estroj de la asocio.

Meksikurbo, je la 31a de majo 2010

Mallely Martínez Mateos
Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL DE LA FEDERACIÓN MEXICANA DE ESPERANTO, A.C. 2010

LA FEDERACIÓN MEXICANA DE ESPERANTO, ASOCIACIÓN CIVIL, convoca a todos los asociados a la asamblea general que se celebrará el día 4 de septiembre de 2010, a las 10:00 horas, en la sede oficial de la asociación que se encuentra en Av. 523 # 187, 1a. Sección de San Juan de Aragón, del. Gustavo A. Madero. Distrito Federal. CP. 07969. La asamblea se sujetará a la siguiente:

Orden del día:

1.- Inauguración, lista de presente de los asociados y aprobación de la orden del día.

2.- Reporte anual de la directiva.

4.- Asuntos generales:

a).- Plan de trabajo.

b).- Exploración de la sede del próximo congreso nacional.

c).- Información sobre la entrega de propiedades de MEF de la ex mesa directiva a la actual.

México, D.F., a 31 de mayo de 2010

Mallely Martínez Mateos

Presidenta de la Federación Mexicana de Esperanto, A.C.

LASTAJ RIMARKINDAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO

★ ★ ★

Post forta, efika kaj daŭra laboro de Gilda Muñoz kaj Mallely Martínez, estroj de la meksika ***Universidad Autónoma de Baja California*** (UABC) akceptis kaj publikis en ĝia oficiala gazeto ke ***"Esperanto: Lengua y Cultura"*** (Esperanto: Lingvo kaj Kulturo) **estu oficiale instruota** en du fakultatoj de la menciita universitato, t.e, en Tijuana kaj Mexicali. Tio signifas ke la geestudentoj ricevos poentojn pro lerni la lingvon. Farendas ankoraŭ multe ĉar nia celo estas ke, de komence, la unua provo de la projekto sukcesu kaj tiel la kurso estu daŭre ofertota. **Ni bezonas vian apogon!** Kiel?

1) (Re)**fariĝu** aktiva **membro** de **MEF**, bv. vidi en la sekva ligo kion fari por membriĝi http://www.esperanto-mexico.org/eo/node/11
2) **Donacu monon** por apogi la projekton; a) deponu ĝin al la konto de MEF en Meksiko, banko HSBC 6284087436, nome de Morayma Martínez, kasistino de MEF, b) ĝiru ĝin al la konto de MEF ĉe UEA (mefa-h), aŭ c) por mondonacoj per kreditkaro bv. kontakti al Mar Cárdenas, skribu al amikema@aol.com
3) **Donacu librojn** en bona stato por trasdoni ilin al bibliotekistoj de la UABC. Bv. sendi ilin al:

   Meksika Esperanto-Federacio
   Av. 523, No.187,
   1a Sección de San Juan de Aragón,
   Del. Gustavo A. Madero
   México, D.F. CP 07969

4) **Kundividu** kun ni **viajn** instruajn **spertojn** en tiaj kursoj kaj informu al ni pri taŭgaj materialoj, kiujn vi uzas por pli bona instruado. Bv. skribi al informacion@esperanto-mexico.org

★ ★ ★ ★ ★

Maje, Mallely Martínez kaj Daniel Moreno, prezidantino kaj ĝenerala sekretario de MEF respektive, havis paroladon kun anoj de la **Internacia Konsilio de la Socia Monda Forumo (IKSMF)** por informi al ili pri la pluraj avantaĵoj de Esperanto kaj oferti la necesan helpon rilata al la propono farita de J. Luis Gutiérrez Lozano, meksika samideano kaj membro de IKSMF; "uzi la Internacian Lingvon Esperanton kiel laborlingvo inter la membroj de IKSMF". Ni atendu kiel evoluas la aferon, momente la panoramo ŝajnas bona, atentu pri la novaĵoj Esperante ke ili estu pozitivaj!

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

Sur la listo de partoprenantoj de la 95ª UK aperas jam 31 meksikaj samideanoj, tamen ni havas la certecon ke aliĝos pliaj. Laŭ la statistiko, **Meksiko** troviĝas nun en la **8a loko** laŭ la nombro de **UK- kongresanoj**. Krome rimarkindas ke tiu ĉi fojo ne nur partoprenos plenkreskuloj sed ankaŭ infanoj kiuj aĝas inter 7 kaj 12. Ĝis nun pli ol **20%** de la etaj partoprenontoj en la **41ª Internacia Infana-junula Kongreseto** estas **meksikanoj**, krome du virinoj, ĵus bakitaj lernantinoj de Morayma Martínez, partoprenos kiel helpantoj aranĝante kelkajn aktivecojn por la etaj verduloj. Simila estas la partopreno de niaj samlandanoj en la "**seminario por aktivuloj**" okazonta samloke kaj tempe ol la ILEI-Konferenco en Matanzas… ni esperu ke tiuj aktivuloj **revenu Meksiken** plenaj da novaj konoj, ideoj kaj fortoj **por helpi** nin **plibonigi la movadon** nacie kaj monde! Kompreneble ni ne forgesu mencii ke en la 66ª IJK pluraj el niaj veraj kaj kor-junuloj ĝuos unu el la plej atendemaj kongresoj en Esperantujo.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

PRI EKSTERLANDA AGADO

SALUTU MIAJN VILAĜANOJN!

Pascal Bergeot

En la kultura domo "*François Rabelais*" de franca vilaĝo *CHANGE*, kiu situas 5 km for de "*Le Mans*", ekde pluraj jaroj oni organizas kune kun lokaj voluntuloj kulturan festivalon nomatan "*CHANGE D'AIR*". Tiu nomo estas vortludo pere de la nomo de la vilaĝo, kiu signifas "ŝanĝi aeron".

"*CHANGE D'AIR*" naskiĝis kiel helpprojekto de la kultura domo, kies celo estas krei ligojn inter la vilaĝanoj. Dum tia aranĝo, ni malkovras aliajn popolojn, vivmanierojn sed ankaŭ ni renkontas niajn najbarojn. Najbarojn kiujn ofte oni ne konas aŭ kiujn oni ne alparolas, nur kapsalutas. Tiel ni kreas ligojn inter ni.

Dum la 19 pasintaj festivaloj ofte la temo estis malkovri landojn, inter ili Meksiko (2009), Barato (2008), Kubo (2007), aliaj invititaj estis Brazilo, Japanio, Usono, Kanado, Portugalo, Egipto, Irlando, Italio, Peruo, Rusio, ktp. Rimarkindas ke iam la temo estis; "la vivo dum la epoko de *François Rabelais*", fama franca verkisto de la 16a jarcento.



Ĉijare, inter la 10a kaj la 21a de novembro, por la 20a eldono, la temo estos rememori la belajn momentojn de la pasintaj festivaloj. Sed tio, kio plej gravas por la samideanoj, ne



nur de "*Change*" sed de la mondo, estas ke en tiu ĉi 2010 ni sukcesis aranĝi esperantan koncerton en la festivalo. La fama esperanta kantisto, JoMo kantos la 12an de novembro, tiam ni kaptos la okazon por konigi Esperanton. Ni klarigos ke Esperanto estas mirinda komunikilo kaj ke homoj en la tuta mondo parolas tiun lingvon, sed ĉu oni kredos nin nur dirante tion? ĉu oni ne pensos ke ni estas revuloj? Tial ni, la esperantistoj de la mondo, unuiĝu por montri ke ni ne estas kelkaj sed multaj viglaj esperantistoj en la kvin kontinentoj. Dum la koncerto mi lum-ĵetos fotojn sur grandan muron. Fotojn de vi, geesperantistoj de la tuta mondo. Sendu al mi foton kaj mallongan frazon por saluti la spektontojn. Ekz: "Meksiko varme salutas al CHANGE" aŭ "Ĝuu la koncerton, same kiel ni ĝuas Esperanton ĉie!" ...mi certas ke vi trovos amikeman frazon.

Sur via foto, mi aldonos vian frazon, vian antaŭnomon kaj vian landon. Ne zorgu pri la aldono de via salutmesaĝo sur la foto, mi faros tion. Mi petas de vi sendu ĉion ĉi-tien: shanghiaeron@gmail.com Kian foton mi ŝatus? Portreton de vi - portretojn de vi kun familianoj – vi kun viaj geavoj, viaj infanoj aŭ nepoj - vi kun kares-bestoj – vi antaŭ nacia monumento – vi antaŭ karakteriza pejzaĝo.

Inter aliaj aktivecoj okazontaj en la 20a kultura festivalo "*CHANGE D'AIR*" estas;

- infana parado tra la stratoj de la vilaĝo, brazila muziko akompanos ilin,
- du muzikaj vesperoj; 1) rilata al la epoko de *Rabelais*, en kiu ankaŭ ni manĝos kiel en tiu tempo kaj 2) ludos muzikistoj el Balkanoj,
- prelego pri homaj migraj movadoj,
- raport-filmo pri inversa travivaĵo de malkovrita popolo, t.e. ofte okcidentanoj malkovras originan popolon sed en tiu filmo sudamerika indiĝeno malkovros Eŭrop-vivon.
- vespero malkovrigonte dancojn el la mondo.- ktp.

Vi ankaŭ sanĝu la aeron kaj partoprenu fote kaj anime la festivalon!

ĈU VI KONAS LA TERON? estas scienca verko, kiu temas pri Geologio kaj ĝiaj diversaj partoj, kiel ekzemple Geonomio, Geokemio, Mineralogio, Paleontologio, Geofiziko, inter aliaj.
La libro estas bone kaj simple skribita, tiamaniere oni povas kompreni kiel funkcias multajn naturajn fenomenojn ĉar ***Endre Dudich*** en ĉiu ĉapitro komencas la verkadon klarigante la terminologion per kompreneblaj vortoj. Oni ankaŭ povas rigardi multajn malsamajn tabelojn, figurojn kaj bildojn kiuj helpas kompreni la enhavon de la verko. Ĝi estas interesa por ĉiuj personoj, sed multe pli interesa kaj komprenebla por tiuj, kies fako rilatas al tiaj sciencoj. Se vi ankoraŭ ne havas ĝin, faru vian mendon al Meksika Esperanto Federacio. La prezo estas nur $100.00 (cent meksikaj pesoj) plus sendokostoj.

AŬTUNO EN LA PRINTEMPO estas bela romano de ***Ba Jin***, fama ĉina verkisto kaj elstara esperantisto, kiu sentis sin forte inspirata pro la esperanta romano de *Julio Baghy* “Printempo en la Aŭtuno”. La rezulto de tiu kortuŝo estis lia ĉinlingva verko en 1932, la esperanta traduko estas ***Aŭtuno en la printempo,*** kiu aperis en 1980.
La romano temas pri la amproblemoj kaj duboj de *Lin*, protagonisto de la verko, kiu freneze amas al *Rong* kaj kiu, konscie aŭ ne, estas markata pro la memmorto de lia frato.
Akiru tiun ĉi belan verkon en la libroservo de MEF. La prezo estas nur $70.00 (sepdek meksikaj pesoj) plus sendokostoj.